



Eldonata de : Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47340 LAROQUE TIMBAUT  
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux  
\*\*\*\*\*

\* Abono por unu jaro :  
\* 18FF (Francio : 15FF)  
\* - aŭ egalvaloro -  
\* al la ĉi-apuda pĉk.  
\*\*\*\*\*

## ENHAVO

2. Esperanto-gramoj (A.Madej)
3. Mi ne permesis min dormigi  
(novelo de A. Kossakowski)
13. Jus aperis (Kribo)
14. Poezio : "Poetic 7"
15. Vivo de "Laŭte!" (Kribo)
16. Sin nutri praule (Dazun)
17. E-vivo : kontribuoj de LUPO,  
S.P.H., Gente, J.G., Kribo,  
Lloancy, Déjean, Vito, Perez.
21. Ĉies tribuno : Meunier-Guttin,  
Vito, - mn - , Gilles kaj la  
Eysines-grupo.
25. LaŭteEkologio :  
En Golfech la 4an  
de Oktobro. Post la  
"debato" (Kribo)
28. Tipaĵoj kaj notind-  
aĵoj pri vojaĝo al  
Brazilio kaj Rio  
(Louis Ensuque)
31. Nia adresaro.
32. Nia felietono :  
Tra la mondo...  
(Alfa-Beta)
35. Libroservo de AERA.

Jen numero tute sena je desegnoj... Vera skandalo,  
ĉu ne ? Cetero, ni hontas. Sed honti ne sufiĉas.  
Ek al via tuĉo !

Lastminute ! La venonta kunveno de Ĝirondia E-Grupo okazos  
en MARCENAI, Salle des Fêtes, 21an de Novembro, je la 15a.

# ESPERANTO - GRAMOJ

PROVERBARO ESPERANTA kun KOMENTOJ  
\*\*\*\*\*

2227 : "Se geedzoj sin batas, fremdulo restu flanke".  
Malgraŭ, ke li al la edzin' ardas flamante.

2222 : Sinjoroj ! Kial nin ĉi proverb' ne spronas ?  
"Se edzino ordonas, domo ordon ne konas".

2583 : Samideanoj ! 655 : "Geamantoj sin pikas".  
Jen ne slogano : Pikas ? Ĉu preseraro?  
"Vivi emerite"  
Ne signifas  
Vivi E-merite !

2575 : "Virta virino straton ne konas"  
En propra lit' al ĉiu ŝi donas.

68 : "Amaso da fianĉoj, sed ĝusta ne venas."  
Tamen ĉiu ŝin prenas.

PANORAMO DE POLAJ EPIGRAMOJ  
\*\*\*\*\*

Jan Izydor Sztadynger

## Neniam

Neniam knabinoj min rifuzis,  
Tiuj, kiujn mi en sonĝo uzis.

## Malfrue

Por kio al vi inkognito  
Se vi jam alkrucigito.

## Al kamarado

Kvankam vi estos en medio burĝa  
Kamarado ĉiam restu ruĝa.

## La sveltulino

Tiu ŝin ofendas  
Kiu veston al ŝi ne descendas.

## Por buĉo

Kiel savi ĉi ŝafidon  
Kiu mem volas lupidon ?

## Atendata surprizo

Iun matenon mi ne vekigos  
Jen, atendata surprizo.

## Koloraj makuloj

Se estas makulo je la honoro  
Nepre ĝi estu en bela koloro.

trad. Antoni Madej  
\*\*\*\*\*

Andrzej Kossakowski

MI NE PERMESIS MIN DORMIGI

**S**ur la ferdeko de "Euforio" mi ektroviĝis parte pro hazardo. Ĝis nun ankoraŭ neniu ĵurnalisto sukcesis starigi sian piedon sur la Arĝenta Globo - sciencistoj ne ŝatas, kiam gazetaro spionas ilin okulumante iliajn manojn. Tamen dank'al la protekto de unu tre alte postenigita persono mia nomo ektroviĝis sur la listo de pasaĝeroj de "Euforio", malgraŭ akra veto de profesoro Krassner.

En la trafiko T-L regis tiam strangaj kutimoj. La multjara praktiko pruvis negativan influon de la kosmoflugo je la psiko de pasaĝeroj. Do pro tio ĉiu homo fluganta al la Luno estis speciale dormigata kaj tiel li traflugadis spacon ĉirkaŭ duonmilionon da kilometroj. Pro la denaska scivolo, kaj ankaŭ pro spitemo, mi promesis, ke mi ne permesos min dormigi. Tiucele mi faris strikte sekretan interparolon kun unu el miaj amikoj-kuracistoj, rezulte de kio mi fariĝis posedanto de malgranda ampolo kun verda fluidaĵo kun forta efiko antidormiga kaj krome de kelkaj tablojdoj en lada skatoleto. En la tago de starto mi injektis al mi la fluidaĵon kaj poste iris al la Kosmo-haveno. Post la detala kontrolo de identeco de ĉiuj vojaĝantoj oni elvokis nomojn de la apartaj pasaĝeroj. La elvokito malaperadis post iu pordo. Kiam venis mia vico, mi ektroviĝis en la kuracista kabineto. Blanke vestita viro ekridis al mi afable. Li ordonis al mi levi la manikon. La injekto daŭris eble sekundon kaj nenion doloris. Poste la kuracisto montris al mi iun pordon.

En la salono, similanta tranoktejon, staris multe da sofoj. Miaj estontaj vojaĝamikoj dormis kuŝante en pitoreskaj pozoj. Mi kuŝiĝis kiel ĉiuj kaj fermis la palpebrojn. Komenciĝis la aventuro.

Subite mi eksentis, ke oni min portas. Du viroj, unu tenis min sub brakoj kaj la alia ĉe piedoj, interparolis

laŭte en la ejo kun nekutima rezonado.

- Portu atenteme ĉi redaktoreton. Ĉar se li vekigis antaŭ la perangusto, povus okazi granda skandalo.
- Kial ĝuste li devus vekigi ? Ankoraŭ al neniu tio okazis, kaj ja ni perangustis kelkajn milojn da homoj.

Ili kuŝigis min sur io mola kaj foriris. Mi levis iom la palpebrojn kaj tra la fendeto interpalpebra mi rigardis ĉirkaŭen. Mi troviĝis en la interno de granda ejo kun vandoj kaj plafono tegita per fosforeska materialo. En blua lumo mi ekvidis kuŝantan apud mi profesoro Krassner. Lia barbeto briletis per metaleska nuanco. En la ejo mankis iu ajn meblaro, kaj multaj figuroj, kies siluetojn mi ekvidis levinte la kapon, kuŝis - simile kiel mi - sur la mola planko. Ĉu tio estas interno de la raketo, per kiu ni estos elportitaj sur "Kopernikon", la ĉirkaŭteran transigan kosmostacion, nur de sur kiu startos "Eŭforio"? Tamen io ne plaĉis al mi ĉi tie. Mi ne povis rememorigi al mi kiam oni levis min el la sofo kaj portis en ĉi tiun ejon. Hej, - mi ekpensis, ŝajnas ke mi tamen dormis iomete. Do ĉi mia verda injekto ne efikis antidormige en cent procentoj. Oni devus ankaŭ gluti la tablojdojn. Tiuj ĉi viroj parolis pri iu perangusto. Kia diablo ĝi estas ?

Ne devis mi longe atendi por solvi la enigmon. Jen oni enportis ankoraŭ kelkajn personojn.

Mi ekaŭdis krakadon de pordoj kaj samtempe estingiĝis la blua lumeto. Mi eksentis min malagrabla, kaj ekregis min iu nedifinebla timo.

La planko facilete ekstremis, kiel vitro en proksimeco de raketo. Ia nereconebla vibrado infektis mian korpon. Ĝi estis apenaŭ sentebla, sed tre malagrabla. Samtempe mi eksentis ĉirkaŭprenantan min fridon, grandigantan kun ĉiu sekundo. Kion ? Ĉu oni nin glaciigas ? La dentoj komencis klaki pro malvarmo kaj la haŭto kuntiriĝis sur la vangoj. Tiumomente mi konsciiĝis pri iu zumado, vibranta en la aero. Pasis apenaŭ duonminuto, kiun mi travivis blasfemante kontraŭ la tuta mondo. Poste la vibrado komencis iom post iom ĉesi, kaj la temperaturo leviĝis.

Reekbrilis la blua lumeto kaj tiam mi rimarkis, ke la ejo, en kiu mi troviĝas, grandigis ĝis monstraj dimensioj.

Krakis iuj rigliloj, do fermis mi okulojn. Eksonis iu voĉo, kvazaŭ fortigita per megafono.

- Malvarme ĉi tie sur nia "Koperniko". Mi ne povas alkutimiĝi.

Sur "Koperniko" ? Malkuraĝe malfermis mi unu okulon. Ie en konsiderinda alteco aperis du grandegaj homaj korpoj. Unu el la grandeguloj tenis en siaj manegoj iun diafanan ujon je grandeco de trietaĝa domo.

Tiumomente mi komprenis : perangusto signifis malgrandigon de homo ĝis dimensio de kelkaj aŭ dekelkaj centimetroj. Mi estis perangustita...

Mi kuŝis duone konscia pro la emocio kaj kun retenita spiro atendis la starton. Post momento oni enportis nin perangustitojn, sur la ferdekon de "Eŭforio" en tiu ĉi diafana skatolego. Ĉiu kuŝis en aparta intervando, forte alfiksitita al la elasta planko. Ne estis tio oportuna pozicio.

Subite infera bruego ekstremigis la kosmoŝipon, samtempe iom estingiĝis la lumoj kaj mi eksentis, kiel antaŭ la okuloj rotacias cirkloj. Mi fariĝis peza kvazaŭ el plumbo. La pulsanta sango diskrevigadis al mi tempiojn, la ventro kaj koro ek troviĝis ĉe la spino. Malfacile mi kaptis aeron kaj ankoraŭ kun pli granda peno ĝin elspiradis. Kial tiuj ĉi motoroj tiom longe funkcias ? Jam ili devus delonge silenti. Ne, tio estas nur iluzio - fakte ni ne flugas pli ol unu minuton. Ankoraŭ kelkdek sekundojn, ankoraŭ dekelk, nu, - jam sufiĉas !

Kvazaŭ al mia ordono la motoroj ĉesis funkcii. Post la freneza bruo ekregis tiel absoluta silento, ke la propra pulso ŝajnis kiel frapado sur grandan tamburon. Kiel bone, ke mi ekdormis tie en la Kosmohaveno. Mi ne domaĝis "agrablecon" de flugo al "Koperniko" kaj emociion de ankoraŭ unu starto.

Iom post iom, laŭ verma movo, mi elŝoviĝis el mia kokono. Unuamomente la sento de senpezo distris min, sed la ludo estis mallonga. Kelkaj suferigaj frapoj, kiuajn mi kaŭzis al mi pro malatentemaj movoj, devigis min al pli granda singardemo.



La unua formo, kiun mi ekvidis, estis la kapo de profesoro Krassner. Apartigita de mi per diafana vandeto, li dormis kiel ĉiu honesta homo. La povra sciencisto neniam sciigos, ke li traflugis distancon Tero-Luno kiel liliputo. Mi decidis eliri, por vidi kio okazas aliloke. En la distanco, kiu al mi ŝajnis sufiĉe granda sed fakte estis ne pli ol unu metro kaj duono, sidis postaĵe al mi grandegulo en skafandro. Per la dekstra mano li manipulis ĉe iu kontakto, en la maldekstra li tenis mikrofonon. Subite fortega voĉo timigis min.

- Halo, Tero, Tero ! - vokis la piloto - ĉi tie "Eŭforio", "Eŭforio"... Tero, Tero...
- Ĉi tie Tero, Tero - respondis al li nevidebla megafono. Halo "Eŭforio". Sciigu pozicion Ro ! Sciigu pozicion Ro, mi literumas : Romo, Omega.
- Halo Tero, "Eŭforio", mi sciigas Ro : nul, nul, nul, sep, nul, kvar, unu.
- Nul, nul, nul, sep, nul, kvar, unu - ricevita. Kiel vi fartas ?
- Dankon, bone !

La piloto demetis mikrofonon, turnis ruĝan ŝaltilon kaj kliniĝis super la pupitro. Min ekregis subita emo iom paroli kun tiu ĉi homo. Cetere jam enuigis min la soleco, aldone ligita kun konscio pri mia groteska kresko. Sed kiel en la medio de sengravito atingi lin ? Flugi aŭ ŝoviĝi kroĉiĝante al io ajn ? Post iom da pripenso mi decidis elekti flugvojaĝon - ja tio estas ĉiam pli interesa kaj pli facila. Mi elrampis sur la vandon kaj stariĝis paralele al planko. Cetere estas amuze kiam mankas gravito. Ne estas nocioj "supro", "malsupro", "ekvilibro". Oni ne povas fali, renversiĝi, aŭ faligi ion ajn. Mi celis per la kapo la molan drapiraĵon de vandeto super la piloto kaj etendinte manojn, mi facile depuŝiĝis per piedoj de la skatolo. Mi flugis preter la kapo de la sidanto, kaj momenton poste miaj manplatoj atingis la vandon. La piloto ekrigardis min kaj ... konsterniĝis. Mi sidiĝis sur la vando kaj ekridetis al li amike. Svingante per la mano mi vokis al li.

- Ne konfuziĝu, sinjoro !

Ho, se mi povus antaŭvidi lian reagon, kiu tiam sekvis!

La piloto paliĝis, malfermis la buŝon, ekpalpebrumis kaj fermis la okulojn. Bela historio - mortis aŭ en plej bona okazo svenis la homo, kiu gvidas la kosmoŝipon ! Proksimiĝis mi al lia nazo kaj facilige konstatis, ke li spiras. Do li vivas. Oni devas lin rekonsciigi. Mi tute ne sciis, kiel kun mia dekcentimetra kresko mi povos tion fari. Embarasite, mi metis manon en la poŝon por preni cigaredon. La mano trovis ion platan kaj longan. Revelacio : antidormigaj tablojdoj ! Ĉu nur unu sufiĉos ? Ja ili kune kun mi estis perangustitaj. Mi atingis la buŝon de la piloto. Bonŝance, ĝi estis malfermita.

"Tion oni ne glutas, sufiĉas meti sub langon" - mi memoris la atentigon de la amiko-kuracisto. Kun peno mi levis lian langon kaj sur la humidan mukozon mi metis tri tablojdojn. Poste ambaŭmane mi platiĝis la langon kaj rapide rampis eksteren. Kroĉiĝinte al la granda brako, streĉe mi observis la vizagaĵon de la sveninto. La paleco de la vangoj komencis cedi. La palpebroj leviĝis, ekflirtis kaj ree fermiĝis. La buŝo fermiĝis kaj la makzeloj ekmoviĝis, kvazaŭ li ion maĉus. Aŭdiĝis profunda fajfa spirado. Ŝajnis, ke en lia organismo okazis iu ŝanĝo - kvazaŭ el la svena stato li transiĝis en dormegon. Tio ŝajnis al mi tute neprobabla, ja la tablojdoj devis efiki antidormige. La amiko-kuracisto klare diris : "Tion havu ĉe vi, por ĉiu okazo. Uzu, se vi ne plu povus elteni". Tio signifas, se mi sentus, ke malgraŭ la verda injekto minacus al mi ekdormo, tiel mi komprenis liajn vortojn. Sed se ili signifis ion alian, tute kontraŭan ? Se ili estas dormigaj tablojdoj, kiujn mi devis gluti, se mi ne povus elteni la staton de konscio ? Jes, tio ne povis esti io alia, nur dormigaj tablojdoj !

La nura prudenta ago, kiun mi povis fari, estis kontaktiĝi kun la Tero. Mi proksimiĝis al la ruĝa ŝaltilo, kiun uzadis la piloto kaj per granda fortostreĉo mi turnis ĝin. Poste mi aliris la mikrofonon kaj kriis per la tuta forto: - Halo ! Halo ! Halo !

La megafono silentis. Mi sentis la tutan tragikomediecon de la situacio : jen malgranda hometo kun liliputa voĉeto volas paroli en etero tra distanco je dekoj aŭ centoj da miloj da kilometroj helpe de aparataro adaptita por normalaj homoj.



- Halo! Halo! Halo! - mi vokis perfortante la gorgon.

Fine en la megafono aŭdiĝis krakado, en laŭta zumado mi ekaŭdis voĉon :

- Halo, "Eŭforio", "Eŭforio" ! Ĉi tie Tero, Tero. Kio okazis ? Kio okazis ?

- Ĉi tie "Eŭforio" - mi kriis en stato de subite vekita espero. Ĉi tie "Eŭforio", "Eŭforio". Halo !

- Halo, "Eŭforio". Nenion mi aŭdas. Ŝanĝu kontakton al BV. Kontakto BV !

Ili supozas, ke estas iu averio de radiosendilo kaj ordonas transiri al iu alia speco de komunikado. Sed kio estas ĉi BV ? Kiel tio aspektas, kaj kie tion serĉi ?

- Halo, "Eŭforio" ? Kio okazis ? Aŭdiĝu per BV !

Mi ne serĉos iun BV ! Ne scias mi, kio ĝi estas kaj por kio ĝi taŭgas. Anstataŭe mi provos signali per morsa kodo, frapegante per io sur la mikrofonon. Rapide mi demetis ŝuon kaj per la tuta forto mi trifoje frapis la mikrofonon. Bum... bum...bum...

- "Eŭforio". Dissendu BV ! Dissendu BV !

- Bum...bum...bum...

- Kial vi ne dissendas BV ?

- Bum...bum...bum...

- Ĉu vi freneziĝis ? Kial vi frapas mikrofonon ? Se volas vi ion diri, do diru sed ne tordu al ni la kapon.

Do ili ekaŭdis min. Ili supozas, ke la piloto faras stultajn spritaĵojn kaj eble ili pretas rompi la kontakton. Preskaŭ freneze mi komencis elfrapadi la signalon S.O.S. Foj, du, tri... Komprenis.

- "Eŭforio" kio okazis ? Kial vi ne parolas ?

Mi elfrapis mián nomon. Konsterniĝo. Post momento :

- Do signalas vi redaktoro ?

- Jes, mi respondis, la piloto dormas, kaj mi ne.

Ree konsterniĝo. Mi sentis, ke la mano doloras min.

- Kiel tio okazis ?

- Mi vekigis, la piloto ekvidis min, svenis. Savante, erare mi aplikis al li fortan dormigan medikamenton.

- Brave ! - la voĉo sonis ironie kaj nerveze. Bonvolu atendi niajn dispoziciojn. Nenion faru mem.

Pasis apenaŭ tridek sekundoj, kiujn mi pasigis meditante pri miaj kompromitiĝo kaj dekadenco de la kariero.

- Halo, redaktoro, ĉu vi aŭdas ? Nun nenio minacas sekurecon de la kosmoŝipo, ĉar ĝi estas stirita de ni el la Tero. La flugo okazas laŭregule. La piloto estos necesa, kiam la kosmoŝipo proksimiĝos al la luna satelita stacio. Se li ne vekigis, la kosmoŝipo preterpasos la Lunon kaj fuĝos en la Kosmon. Do, aŭskultu bone. Je alteco de la kapo de la piloto troviĝas klapo. Interne estas skatoloj kun injektoj por veki dormigitajn pasaĝerojn, kaj ankaŭ injektiloj. Bonvolu kontroli kaj respondi.

Mi atingis la klapon kaj kun peno ĝin deŝovis. Mi trovis tie multajn ampolojn longajn kiel mia suro. Apude en teniloj staris kvar injektiloj.

- Mi ne sukcesos - signalis mi per ŝuo - tro eta.

- Vere -- en la voĉo el la Tero sentiĝis ereto da amuziĝo. Sed tio estas nur momenta, dum vojaĝo. Ne emociiĝu. Do, sinjoro redaktoro, oni devas veki profesoron Krassner. Faros vi tion, enŝovante al li en la buŝon guton da fluidaĵo, kiu troviĝas en la ampoloj.

Mi desaltis de pupitro, glitis al la malfermita klapo. Trui molan plastikan ampolon neniel estis malfacile. Pli malfacile estis eltiri la fluidaĵon, kiu en la kondiĉoj de sengravito ne volis elverŝiĝi eksteren. Plilarĝiginte la truon, helpe de la fontoplumo per fingroj mi eltiris sufiĉan guton. Puŝante ĝin antaŭ mi, kiel infanan baloneton, mi komencis malfacilan kaj aventurplenan revenvojaĝon al la dormanta profesoro. Kiam mi deŝovis lian malsupran makzelon kaj enmetis la guton, Krassner preskaŭ tuj malfermis la okulojn, eksaltis, volante sidiĝi.

- Kion tio signifas ? - li balbutis. Pro kio vi min vekas ? Ĉu estas jam la Luno ?

Mi volis al li ĉion klarigi, sed tuj post la unuaj vortoj li interrompis min kolere :

- Do vi memvole min vekis antaŭ finiĝo de la vojaĝo ? Bonvolu tuj lasi min sola.

- Aŭskultu min, profesoro - mi vokis senespere . Okazis tragedio kaj mi devis vin veki.

- Nu, kio okazis ? - demandis li malfide.

Mi komenĉis de tiu ĉi povra perangusto, sed li ree rompita al mi :

- Kiel do ? Do mi kaj vi, kaj ili ĉiuj, havas po dek centimetroj da kresko ? Ĉu vi frenezigiĝis ? Do vi min vekas nur por rakonti tiajn stultaĵojn ?
- Mi montros al vi homon ne malgrandigitan - mi diris. Mi nur liberigu vin de tiuj ĉi teniloj.

Li jam ne plu rezistis kaj post momento li rampis eksteren, el la skatolo, dum kiu ago Krassner frapis diversajn korpopartojn kontraŭ vandoj kaj plafono. Ekvidinte la grandan korpon de la piloto li spasme kaptis mian brakon.

- Vere ! - ĝemis li terurigita. Do ili vere nin malgrandigis ! Mal-grand-ig-is ! - li tremis pro kolero. Tio estas skandalo ! Krime ! Kiel oni povas ŝanĝi grandecon de homo sen liaj konsento kaj volo ! - kriis li ruĝiĝinte pro kolero, skuante la barbeton. Bonvolu voki tiun ĉi homon - li montris la piloton - kaj mi diros al li, kion mi opinias pri tio.

- Mi ektimis, ke povas lin kapti koratako pro emociiĝo.
- Mi ne povas lin voki - mi diris - ĉar ĉi homo dormas. Pro tio estas la tragedio.
  - Tragedio, vi diras ? Tio estas plej ordinara farso ! Oni malgrandigas homojn, enpakas ilin kvazaŭ sardinojn en skatolon, kaj oni mem trankvile dormas. Tuj lin veku, mi petas !
  - Mi ne povas tion fari sen via helpo. Komprenu, sinjoro - mi petegis lin. La piloto erare glutis dormigan medikamenton, kaj se li kiel eble plej rapide ne vekigos, ni preterpasos la Lunon kaj senrevene flugos en la Kosmon.

La profesoro estis netrankviligebla.

- Neniel tio min interesas - li respondis kolere.

Kaptis min akuta kolero. Mi lasis Krassner al la propra sorto kaj mi ree glitis al la mikrofono. Kelkfoje mi frapegis ĝin per la ŝuo.

- Halo, redaktoro - diris la Tero - ĉu plenumita la ordono ? Ĉu la profesoro sciigita pri la afero ?
- Diru al ili - ekkriis la sciencisto, starigante sin perpendikle al la vando de la skatolo, ke ili min ne molestu ! Mi ne intencas konversacii kun la homoj, kiuj fiaŭdace disponas pri mia korpo.

- Kolera ! - mi signalis per la ŝuo. - Klarigi malgrandigon, peti pardonon, li ne volas paroli.
- Sinjoro profesoro, pardonu ŝanĝon de la kresko, sed tio okazis pro ekonomio. La malgrandigo de dormigitaj pasaĝeroj, tiel nomata perangusto, ebligas uzadi unupersonan kosmoŝipon anstataŭ centpersonan. Dank'al tio la flugoj kostas 47,3-oble malpli. Sur la satelita luna stacio oni revenigas al la pasaĝeroj ilian normalan kreskon kaj grandecon. Ni tenas ĉi procedon en strikta sekreto, komprenante kiel ega travivaĵo por la homo estus la konscio de multfoja ŝanĝo de liaj dimensioj. Sinjoro profesoro, la piloto de "Eŭforic" dormas, erare li glutis dormigan medikamenton. Se oni lin ne vekos, la kosmoŝipo flugos en la kosmon, kaj vin ĉiujn atendas terura, lanta morto. Helpu nin.

Krassner koncentrite aŭskultis ĉi tondran paroladon. Okulumis al mi per malsimpatia rigardo kaj diris :

- Komuniku per ĉi ŝuo, ke mi helpos. Ili nur diru kion mi faru. Stiri la kosmoŝipon ? Tikleti la piloton, por ke li vekigu ?
- Dankon al vi profesoro ! - tondris la megafono. Nura ebleco veki la piloton estas injekto. Por ĝin apliki, necesas kvar homoj. Unu estos la redaktoro. Vin, profesoro, kiel plej bone konantan viajn kunlaborantojn, ni petas elekti du virojn, kiujn sekve oni devas veki, por ke ili helpu. Bonvolu iom pripensi kaj sciigi la nomojn.
- Ne ! - ekkriis la profesoro kaj deskatoliĝinte kun furio li flugis en mia direkto. Ne, neniam, neniam, neniam !

Mi etendis la manojn kaj kaptis lin en flugo.

- Mi povas fari aliajn aferojn, sed neniu instigos min, ke mi veku tiujn ĉi homojn. Ĉu vi en mia situacio konsentus, ke la subalternuloj vidu vin en paradoksa kresko da dek centimetroj ?

- Sed ja...
- Neniu "ja" ! Mi estas tro grava persono, sciencisto, akademiano, direktoro de la Instituto, ke mi permesu vidigi min en la stato de per-an-gusto ! Ke oni poste montradu min per fingroj, vokante : iras ĉi liliputo, ĉi koboldo.

La povrulo ne sciis, kiel li bone celtrafis. Kun tiu ĉi tremanta duonronda barbeto, pufvanga, same ruĝiĝinte kiel

impona nazo, kun aldone ankoraŭ kalvaĵo ornamita per ŝvelaĵo pro antaŭmomenta frapiĝo kontraŭ iu baro, li aspektis kiel koboldo el iu porinfana fabelo.

- Sinjoro profesoro - mi diris, malfacile regante ridon, kiu jam komencis min konkerti. Nun ne estas tempo por ambicii. Temas pri vivo.
- Ne! Diru al ili, ke mi kategorie rifuzas vekti iun ajn!

Ree ekregis min senespero. Mi komencis mediti ĉu ne sufoki Krassner por poste sen malfacilaĵoj vekti iujn homojn kaj kun ili savi la piloton. Por havi puran konsciencon mi provis ankoraŭfoje.

- Tiel oni ne povas kondukti - mi diris kategorie. De via decido dependas sorto de la tuta ekspedicio. Vi povas disponi pri la propra vivo. Sed ne pri tiu de viaj kunlaborantoj, pri la mia kaj tiu de la piloto.

Tiu argumento efikis kiel sitelo da malvarma akvo. La incitita profesoro ne konsideris la ĉirkaŭon. Nun li videble embarasiĝis. Kun vera plezuro mi observis fulman metamorfozon de kverelema, pro trokreskinta ambicio de sciencisto, en la aktivan organizanton, plenan de fervoro kaj iniciatem.

- Sciigu ilin, ke mi decidis vekti mian asistanton... - tie li diris la nomon. Sufiĉas vekti nur lin, ni estos kune tri. Tio sufiĉos. Kiel oni vekas ?

Mi montris la klapon kaj klarigis, kiel oni devas agi per la fluidaĵo. Ne perdante tempon, li ekvojaĝis tra la aero.

Plue ĉio okazis rapidege. Post momento ambaŭ viroj jam staris apud mi. La asistanto estis pala kaj timigita, tamen klopodis regi sin. Krassner energie ekestris.

- Unue ni eltiru injekton kaj injektilon - komandis li. Nu, ni flugu !

Poste, trui ampolon. Ni enŝovis injektopinglon, post kio la profesoro tiris la piŝteton, forte apogante sin per piedoj sur la pupitro, kaj ni tenis ambaŭmane la injektilon. Kaj fine la operacio mem. La mano de la piloto kuŝis sur la pupitro. Ni starigis la pinglon ortangule al la manplato.

- Unu... du... - kalkulis la profesoro. Atenton : tri !

Per la tuta forto ni enbatis la pinglon. La sciencisto apogis sin plenforte puŝante la piŝteton per la dorso. Kun la plej granda peno, ĝemante pro laciĝo, li puŝis, puŝis, kaj ni, tenante la injektilon, rigardis ravite, kiel kvanto da fluidaĵo malgrandiĝas kun ĉiu sekundo.

Tiel finiĝis la aventuro. Ne devas mi aldoni, ke poste jam sen iuj perturboj ni atingis la celon de nia vojaĝo, kaj ĉio, kion ni travivis, restis nia strikta sekreto.

Nun post multaj jaroj, kiam perangusto nenium plu ŝokas, mi povas fine rakonti ĉi historieton.

Andrzej Kossakowski  
\*\*\*\*\*

Tradukis: Antoni Madej / Pollando /

## JUS APERIS

V. EROŜENKO : Malvasta kaĝo

Eldonis : Japana Esperanta  
Librokooperativo, 88 paĝoj.  
Mendebila ĉe Cercle espérant-

tiste de l'Agonais, 25 FF (vd. la anoncon p.35 de L.n°36)

Ni povas nur laŭdi la obstinon de niaj japanaj kamaradoj por ke fine la esperantista popolo, ĉefe ties okcidenta parto, agnosku la valoron de Eroŝenko, unu el la plej fortaj personecoj de la E-movado en la unuaj jardekoj de nia jarcento. Li, blindulo, havis multon por diri pri la terura mondo, kiu ĉirkaŭis lin. Tion li faris per rakontoj en E (Lumo kaj ombro, La tundro ĝemas) kaj ankaŭ en la japana : apartenas ĝuste al tiu speco la 4 fabeloj nun eldonitaj sub la titolo "Malvasta kaĝo". Miyamoto masao esperantigis ilin, penante "imiti la stilon kaj eviti 'neologismojn', kiujn verŝajne la aŭtoro ne uzus". Aldone, la kompilinto, Mine yositaka, represigis "Vortojn" de Baha'u'llah, kiujn el la angla esperantigis Eroŝenko. Tiu aldono eble povas aspekti superflua. Sed la ĉefa parto ja pravigas la entuziasman takson de Miyamoto : "Niaj kompilintoj aŭ literaturamantoj devas antaŭ ĉio legi la verkojn de Vasilij Eroŝenko. En ili la blinda poeto enverŝis sian emocion kaj lirikecon eĉ superabunde. Lia malespero kaj indigno kontraŭ la socia



maljusto ankoraŭ nun brulas kaj veas al niaj oreloj kaj okuloj, trapenetas nin lia pasio kaj vervo..."

Aparte belas kaj signifoplenas la novelo "Malvasta kaĝo", kie rolas kaptita, sonĝanta tigro. Sed se la poeto kapablas ravi nin per siaj rakontoj, li ne forgesas sian mision alarmi pri la krueleco de l'homa sorto kaj instigi al ribelo.

Kribo

.....  
P O E Z I O  
.....

Nia kdo PIOUS eldonas en franca lingvo la liberecanan poezian revueton "POETIC 7" (\*). Jen mallonga memprezento de tiu simpatia revuo :

"Povas vivi neniu raso, se ĝi ne lernis, ke estas tiel digne kampon kultivi, kiel verki poemon."  
B.T. WASHINGTON.

LIBERECO - EGALCO - FRATECO

Libereco ne ekzistas, kiam cenzuro malpermesas verkaĵon, filmon, teatraĵon aŭ ekparolon.

Egaleco ne ekzistas, kie regas profito, ekspluatado de homo far homo, salajra hierarkio.

Frateco ne povas ekzisti, kiam oni fabrikas armilojn, flegas armeojn kaj tiel nepre preparas venontan mondmiliton.

POETIC 7 deziras per skribo, kaj ĝuste per poezio diskonigi la kriojn de sufero kaj ribelo de l'poetoj, kiuj rifuzas esti blekantaj ŝafoj. Krioj de ribelo, sed ankaŭ de espero kaj kanto de amo en pli harmonia socio, el kiu estos malaperintaj la antaŭjuĝoj, kaj ĉiuspecaj tabuoj.

Skribu al ni por ekkoni POETIC 7, aŭ por esti eldonata. Prezo de unu numero : 8 FF. Abono je 4 numeroj : 30 FF. Ĉiu n-ro, A4-formata, konsistas el 35 poemoj, 50 paĝoj, 3 desegnoj.

(\*) POETIC 7, poŝtkonto : 1992 49 NANTES

adreso : 194, rue Maurice Jouaud, F 49400 REZE.

Abontarifo 1982

Pluraj perantoj deziras sufiĉe frue ekscii pri la eventuala modifo de la abonkotizo al "Laŭte!" por 1982.

Nu, spite al "plugalopanta" inflacio, al plialtiĝo de la afranko kaj de la eldonkostoj, "Laŭte!" restu sampreza ekster Francio : 18 FF. Kompense, la geabonantoj loĝantaj en Francio bonvolu konsenti tre etan "reĝustigon" - kiel diras eŭfemisme niaj registaraj instancoj kaj la spicisto ĉe la stratangulo: en Francio la abono kostos 15 FF.

Evoluo de la enhavo de "Laŭte!"

Komence kreita ĉefe por anonci grupkunvenojn (la nuna rubriko "E-vivo"), "Laŭte" poste ekcedis lokon al debatoj. Krome, unu aŭ du felietonoj (pri ambaŭ alvenis atestoj pri kontenteco de legantoj) stampas la "personecon" de "Laŭte" kiel samtempe informa, foruma kaj kultura. Ĉi-lastata karakterizo espereble estos plifortigita en la venontaj jaroj, dank'al la publikigo de pli literaturecaj tekstoj, ne sufiĉe ampleksaj por konsistigi apartan kajeron en la kadro de la broŝurservo. Ekde nun, do, bonvenon al noveloj, rakontoj, prelegetoj, poemaroj ! Ĉar ni konservu kiel eble plej malaltan abonprezon, ni strebos respekti la dumonatecon de "Laŭte!", t.s., ke jare aperos almenaŭ 6 numeroj, sed iuj estos pli dikaj ol la ĝisnunaj.

Evoluo de la abonantaro

Manifestiĝas la unuaj efikoj de la strebado al "internaciigo" de "Laŭte". La proporcio da nefrancaj legantoj kreskis de 5% en 1979 al 21% en 1981. Tre modesta rezulto, sed kuraĝiga. Sugesto : se nur parto el la franca abonantaro (pli ol 200) varbos al "Laŭte" 1 el siaj eksterlandaj plum-amikoj, la evoluo estos multe pli rapida ! Vi scias pri la efiko de neĝbulo... Sed paralele necesos antaŭvidi iom da konkreta helpo en la Laŭte-ejo por bone plenumi la pli pezan eldontaskon. Sub la neĝbulo ja troviĝas via...

pli kaj pli senhariĝanta Kribo.



Dum estas pli kaj pli malfacile akiri nutraĵojn ne trafitaĵojn de polucio, ĉu ne estas racie rikolti tiel nomatajn sovaĝajn fruktojn en lokoj ŝirmitaj kiel eble plej de ĥemiaj toksaĵoj? Tiuj nutraĵoj de niaj foraj prauloj estas daŭre valoraj por la homaro. Inter multaj jen kelkaj facile troveblaj dum promenadoj kaj ekskursoj:

- \* Azarolo, frukto de azarol-arbedo (crataegus azarolus)  
- france : azerollier.  
En mediteranea klimato, verŝajne kulturebla en aliaj preskaŭ same varmaj regionoj, ekzemple : Gaskonio.  
Per la ĉerizgrandaj bongustaj fruktoj oni faru ĵeleon. Bonefika kontraŭ lakso.
- \* Prunelo, frukto de prunel-arbedo (prunus spinosa)  
- france : prunellier.  
Uzebla nur post frosto por fari konfitaĵon.  
Bonefika kontraŭ lakso, tonika.
- \* Rozo hunda (rosa canica) - france : églantier.  
Ties frukto : hundorozo - france : cynorrhodon,  
tre riĉa je vitamino C, estas uzebla por fari tre bongustan ĵeleon. Ĝi krome entenas vitaminojn : B, E, K, PP. Rikoltenda kiam ĝi moliĝas.  
Bonefika kontraŭ lakso, leŭkoreo, hemoragioj, rena litiazo (kalkulusoj), senvitaminozo, astenio (manko de fortoj), askarozo...
- \* Rubuso (rubus fruticosus) - france : mûrier sauvage ou ronce. Ties frukto rubus-bero estas uzebla por fari bonan konfitaĵon, ĵeleon aŭ sukron. Ĝi entenas vitaminojn A, C. Bonefika kontraŭ lakso, pulmomalsano, angino.
- \* Sambuko nigra (sambucus nigra) - france : sureau noir.  
Ties fruktoj estas uzeblaj por fari konfitaĵon aŭ ĵeleon. Uzenda droge prefere al nutraĵo. Bonefika kontraŭ reŭmatismoj, lumbagoj, dorsdoloroj... Ĝi entenas potasan nitraton. En PIV ni legas, ke ties beroj (drupoj) estas uzataj por suko kaj supo. Kiu bonvolas konigi la recepton de tiu supo?  
N.B. : Ne konfuzi sambuko kaj ebulo (sambucus ebulus)  
- france : yèble, kies fruktoj estas toksaj. Dazun.

En mia lasta artikoleto mi diris, ke la esperantistoj ne plu kantas... Nu, iuj kantis en Bazelo! Inter la kongresaĵoj oni ricevis interesan libron pri "Svislanda fenomeno", ekzempleron de "El Popola Ĉinio", en kiu oni tute ne parolas pri la 20 milionoj da mortintoj sekve de malsato, la 160 milionoj da analfabetoj (rezulto de 10 jaroj da Kultura Revolucio) kaj la 50 milionoj da senlaboruloj, nenio pri la koncentrejoj, kiuj ĉiam ekzistas post Maŭ en 1981... tion vi povis legi nur en la libro de Jacques kaj Claude Broyelle "Apocalypse Mao", eldonita de Grasset fine de 1980. Krom tio, ni ricevis la "Komunan Kantareton", kiu ja ebligis al 20 gekongresanoj kantadi akompane de l'gitaro de Olivier Tzaut, tio reprezentas ĉ. dekonon de la partoprenintoj, sed tio povas esti komenco. Ja ne sufiĉis la broŝureto, sed nederlanda junulo disdonis roneokajeron kaj oni plezure aŭdigis la faman kanzonon de Edith Piaf "La tri Sonorilóĵ", sed tiuj, kiuj kantadis, ne povis admiri la belajn pejzaĝojn, kiujn nia plezurŝipo lasis ĉiuflanke inter Bielo kaj Morato, el kie oni revenis al Bazelo per aŭtobusoj tra bela ĵurasa kamparo.

Jam mi ŝanĝis por havi svisan monon. Mi donis 100FF, mi ricevis nur 35 FS sed mi ne verkos felietonon pro tio...

La organizado de la 54a kongreso estis svisa. Multe da truoj en la programo. La lastan vesperon okazis komuna manĝo en granda salono kun muziko kiel por interkona vespero, oni devis atendi la sesan tagon antaŭ ol rondiri tra la urbo, sed intertempe por plenigi la truojn de l'programo oni povis per la abonkarto tramveturi ĉien ajn, ĉar la tramoj estas tre oftaj, kaj en la kongresejo pluraj organizis forumetojn kaj laŭ mi tio estis interesega momento de la senprogramaj tagoj. Oni bedaŭru, ke OKK ne volis presigi suplementajn paĝojn por la 40 malfruaĵaj aniĝintoj. Ni devas diri, ke la OKK-anoj ne estis multnombraj. La malseka varmo sufokis la kongresanojn. Tiuj, kiuj vizitis la



historian muzeon, povis vidi la foton de la 4a kongreso de la Unua Internacio. En la stratoj mi rimarkis virinojn : spegulŝranko, tio estis ĝermana; eleganta virineto, tio estis romanda. Ambaŭ svisinoj.

Ĉu vi scias, ke apud Bazelo vivas en vilaĝo Allschwill, kie estas tradiciaj belegaj domoj, tre malnova fidela SAT-ano 4472 ankoraŭ aktivulo ?

Mi ne volas fini sen diri, ke en Bazelo, dum nia tuta restado, mi vidis nek arabojn nek prostituitinojn nek almozulojn, kiuj svarmas sur la trotuaroj de niaj urboj. Tio estas ja la "Svislanda fenomeno"...Mi ĉion retrovis en Mulhouse, kie mi devis halti kelkajn horojn por trafi trajnon al Okcitanio.

LUPO.

S.A.T. EN FINNLANDO 1982  
\*\*\*\*\*

Iisalmi kun ĉ. 25 000 loĝantoj situas en la norda parto de meza Finnlando. La tiea esperantoklubo aranĝos SAT-kongreson la 31.7 /6.8.82. En la urbo funkcias tre vigla kaj esperdona grupo, nur antaŭ kelkaj jaroj fondita. La kongresejo estos la loka metilernejo, en kiu okazos la kongresaj aranĝoj kaj manĝado. Samtempe kun la kongreso okazos en la urbo kelkaj festoj, kaj oni aranĝos komunajn programerojn. Post la kongreso direktiĝos ekskursoj al Leningrado kaj Laponio. La vojo de Helsinki al Iisalmi estas ĉ. 500 km, sed en Iisalmi kaj en la nordo estas multo vidinda kaj spertinda.

S.P.H.

PS. La glumarko de la kongreso estas jam disponebla : trikolora (verda, nigra, blanka), tre sobra. 10 ekz-roj kostas 3 FMK, aŭ 3,50 FF.

EN AVINJONO (F) : En La Barbière, la 14an  
\*\*\*\*\* kaj 15an de novembro 1981,  
okazos staĝo de inicado pri esperanto. Ĉiujn necesajn informojn por interesataj konatoj viaj neesperantistaj bonvolu peti de Cercle Culturel d'Espéranto, MJC Croix des Oiseaux, 84000 AVIGNON.

EN DORDONJA DEPARTEMENTO (F)  
\*\*\*\*\*

Dimanĉon 20an de septembro de la 11a ĝis la 22a okazis en Sireuil (apud Les Eyzies) renkontiĝo prizorgata de la Perigorda sekcio de la movado "Internacia Rezisto de Virinoj kontraŭ milito". Dum tiu "Tago por Paco en Perigorda regiono", proksimume dek kvin pacemaj organizoj prezentis siajn aktivajojn per paneloj, disvendo aŭ disdono de broŝuroj, libroj, ktp, kaj por kelkaj mallonga publika parolado.

Kdo J.G. prezentis modestan budon pri esperanto. Pluraj junuloj petis dokumentojn aŭ informojn. Tiu "Tago por Paco" kie ĉeestis pluraj centoj da personoj, estis bona okazo por interŝanĝoj de pacemaj individuoj aŭ asocioj, el kiuj pluraj malbone konis esperanton.

Ni esperas, ke tio estos la komenco de vigliĝo de esperanta aktiveco en Dordonj-io.

J.G.

EN AĜENIO (F)  
\*\*\*\*\*

19/20. de Septembro en Beauville, "Muelejo Carguessac". Sume partoprenis ses personoj el Girondio, du el Tarn-Garonio, kvar el Aĝenio kaj unu el Dordonja departemento. La plimulto alvenis jam sabate. Sabaton vespere okazis diskutado pri diversaj temoj. Dimanĉon matene ni piede promenis al la malnova vilaĝo Beauville kaj poste direkte al Roquecor, survoje kolektante migdalojn, avelojn, rubusojn, eĉ maizon kaj tomatojn ! Ni haltis en arbareto por pikniki improvize same kiel por la sabata vespermanĝo. Ni revenis urgante por atingi akurate je la 15a la muelejon, kie okazis poste kunveno kun ĵus alvenintaj AERA-anoj.

Nia venonta tutregiona rendevuo : en MONTAUBAN, okaze de la Zamenhof-tago, la 12/13. de decembro.

La ĉeestantaj AERA-anoj interkonsentis pri la principo de departementa kunveno en februaro '82. Loko kaj dato : en venonta "Laŭte!". Kribo.

La E-Asocio "P A U - A D O U R" aranĝos "Verdan Staĝon" \*\*\*\*\* (inicado pri esperanto) de la 27a de novembro (18a horo) ĝis la 29a de novembro (je la 17a) en "Vert-Couret" je 30 km de PAU. La gastado



okazos en "Logis du Vert Couret" en Rieulhès, apud Saint-Pé de Bigorre, en unu- aŭ dupersonaj ĉambroj. Kosto de la tuta restado inkluzive de libroj kaj loĝado kaj manĝado : 140 FF. Por aliĝoj skribi al : J. Decobert, 45 avenue Béziou, 64140 BILLERE. (Sendu viajn neesperantistajn konatojn!)

La regiona Z A M E N H O F A T A G O okazos en M O N T A U B A N la 13 -an de Decembro.

\*\*\*\*\*

Eblos alveni jam la 12an, posttagmeze ekde la 17a h. en "Le Foyer de Villebourbon", 25, rue des Augustins (proksime de la stacidomo kaj de la Malnova Ponto).

Jen proksimumaj prezoj :

Por unu persono, tranoktado : 18 FF ; Manĝo (dimanĉe) : 35 FF ; Teatra spektaklo : 20 FF.

Sin anonci sufiĉe frue al : Nicole Déjean, 14 rue A. France, 82000 MONTAUBAN

En S V E D I O : La "Junulara E-Societo de Uppsala" (JESU) invitas ĉiujn al kvartaga internacia renkontiĝo en Bålinge apud Uppsala de la 17a horo, merkredon 19an de majo '82 ĝis dimanĉo la 24a de majo. Oni dormos surplanke, do nepre necesas kunporti aermatracon aŭ iun alian molajn krom - kompreneble, dormsako. Kompleta memmastrumado, humana prezo, facile alirebla ejo (per oftaj aŭtobusoj de la stacidomo). Detaloj pri programo, prezo (versajne ĉ. 250 svedaj kronoj por ĉio), ktp, baldaŭ decidotaj. Kontaktpersono estas Niklas Gustavsson. Vito.

En H I S P A N I O : Nova adreso de la Valencia Esperanto-Grupo : Gran Via Fernando el Catolico, 45-3º, VALENCIA-8 La nova lokalo estas sufiĉe granda. Oni antaŭvidas progreson por la E-movado en Valencio.

P. MEUNIER-GUTTIN : Mi deziras respondi al kritikoj pri \*\*\*\*\* la ebla uzo de q w x y anstataŭ la ne ĉie troveblaj ŝ ŭ ĉ ĝ aŭ la pezaj digramoj imitataj de la Angla kaj tute fremdaj al la raciaj principoj de Esperanto.

La kvar literoj q w x y estas ĉie troveblaj kaj necesaj eĉ en Esperantaj tekstoj por propraj nomoj el plej diversaj originoj, por kemiaj kaj aliaj sciencaj simboloj.

Y estas greka formo de la litero G kiel en horloyo aŭ anyelo, en aliaj vortoj la aspekto estus hispana : levo, revo ; nur iom angla en previ.

Q havus ankaŭ hispanan aspekton : maĝino, tuĝu.

La uzo de X por Ĥ donus rusan-grekan aspekton sed estas jam pli-malpli oficiale akceptita uzi k aŭ ĉ : arkaismo, ĉino , do pli oportune uzi ĝin por ĉ kun kelkaj latinaj trafaj formoj : felixa... aŭ eĉ francaj : dolxa.

Nur la uzo de W estas ja imito de la angla : klawno, Lawrenco...

Plie la adopto de Y kiel laŭvola simpliga formo de Ĝ haltigos tiujn, kiuj volas aldoni novan vokalon (OEO, Lumturo, ktp).

KOMENTOJ DE VITO :

\*\*\*\*\*

- \* pri "La Vojo antaŭen" de L.Mee (Laŭte n°37) : kvankam proporcie regresanta, la proporcio da nelegpovantoj (pli ĝuste "legnepovantoj", red) en la mondo estas 37%. Tiuj homoj komercas nek en la i.l. nek en la angla.
- \* pri "Energio" de P.Signoret : Fakte, kaj "Scienca Revuo" kaj "Ekoperanto" pri-traktis tiun temon.
- \* pri "Uzita papero", respondo de Lucien Angevin : Relegu kion mi fakte skribis, kaj ci ektrovos, ke
  - 1) mi avertas nin kontraŭ tiuj homoj, kiuj TRO bone akceptas maldecajn profitkvantojn kaj fontojn,
  - 2) mi atentigas pri teknikaj problemoj solvendaj okaze de ŝanĝo de teknologio cele al pli racia uzado de krud-materialo kaj energio.

Ĉar mi ja iom laboris kiel poŝtisto, mi dubas, ĉu eĉ tre potencaj - kaj energipostulanta - polvosuĉiloj sukcesus forigi la tre etan kurtfibran paperpolvon, kaj do supozas pli saĝa uzi longfibran paperon por kovertoj kaj presaĵoj sendataj sen kovertoj. Por aliaj uzoj verŝajne ekzistus aliaj solvoj, ekzemple mikrado de novaj kaj malnovaj (reuzitaj) fibroj en proporcia varianta laŭ la uzo. Kiel konate, oni povas produkti paperon el herboj (rizo, alfo) kaj malnovaj tukoj, ambaŭ longfibraj, kvankam mi ne scias ĉu mikseblaj kun lignaj fibroj.

Kiam temas pri absoluta ŝparemo, mi proponus ĉesi presi E-propagandilojn kaj -gazetojn, kaj ankaŭ fermi ĉiujn lernejojn, kie oni amase foruzas paperon tiel malefike, ke la plimulto eĉ ne lernas legi kion aliaj vere skribis, ekzemple en "Laŭte".

P A Ŝ O al E G A L E C O  
\*\*\*\*\*

Ekde 1981, la svedaj telefonjarlibroj mencias senpage kroman antaŭnomon. Tio validas por geedzoj, samloĝantoj - ankaŭ gejoj\* - infano aŭ gepatroj. Bedaŭrinde, en la praktiko, tio signifas, ke la nomoj de la infanoj ne estos menciitaj kaj tial estos same malfacile kiel antaŭe por junul/in/iĉ/o trovi telefonnumeron de alia junul/in/iĉ/o. La inoj eniras la civilan socion, sed la infanoj/adoleskantoj daŭre ne.

VITO.

Maljunulo LA MODERNA VIVO  
rakontas : \*\*\*\*\*

Lastatempe, popolparto sin nomas "EKOLOGIISTOJ". Ili ne povas antaŭvidi la rezulton de sia agado kaj serioze kontraŭstaras al venontaj atomcentraloj.

Tiu agado min memorigas pri pasintaj okazaĵoj, kiujn rakontis al mi mia patro aŭ mia avo.

Mi opinias, ke estas grave tion hodiaŭ ne memori. La tuta vivo ne estas alio, ol eterna rekomenciĝo.

Iun tagon Sinjoro EDISON ebligis, ke du homoj povas interparoli, sen ke unu vidas la alian. Ĉi tiu afero ricevis la nomon "telefono".

\* gejo = samseksemulo

Baldaŭ iuj, malmultaj, sinjoroj portis en sia vestopoŝo tute etan kajereton kun dek aŭ dekdu telefon-numeroj, skribitaj per ilia plumba krajono, por ebligi interparolon. Poste komenciĝis kolera movado kontraŭ ĉi tiuj novaĵoj. "Oni ne plu bezonas fiakron aŭ droŝkon, nek komisiiston, nek poŝtiston... La valoro de ĉevaloj falos al la kvinono de sia hodiaŭa prezo..."

Hodiaŭ, post tiom da jaroj, ĉu la mondo povus vivi sen telefono kaj ĝia sokvanta evoluo... La radio, televido, antaŭdiro de vetero por tri aŭ kvar tagoj per satelito ?

Mi memoras la "nenaturan" devon konekti "akvon per krano", akvon kiu mem "veneniĝas" en tiel longaj metalaj plumbaj tuboj, kies plumbo kreas sen nombrajn danĝerajn venenojn, ktp, akvon pli multekosta ol tiu de la puto en la korto de la sama domo. La hodiaŭa rezulto ? Ĉi tiu sistemo helpis al la malapero de multaj malsanoj, kiel skarlatino kaj aliaj...

Kaj la bataloj de "naturistoj" kontraŭ la vakcinaĵoj...

Por la aŭtomobilo la gvidanton oni nomis "hejtisto", ĉar li hejtis per karbo sian kaldronon de vaporo, kaj neniu "ekologiisto" bremsis ĝian evoluon al la "senfuma" petrol-motore, kiu ankoraŭ morgaŭ estos anstataŭota per elektromotore aŭ eĉ postmorgaŭ per atoma motore, kiel neevitebla sekvo de la krimeca fantazio de petrol-produktistoj. Ne forgesu, ke la unuaj "aŭtomobilistoj" ne povis veturi pli rapide ol 20 km-ojn hore... por ke ĝendarmo - sur sia ĉevalo - povu ĝin haltigi.

Koncepto hodiaŭ ridinda...

Pri la fervojo : "La lokomotivo ne povos veturi" - oni kriis en parlamento... "Ĝi glitos per siaj glitaj radoj sur siaj glitaj reloj"... "kaj eĉ se ĝi ruliĝus, gardisto kun ruĝa flago devus iri antaŭ ĝi"... kaj ankaŭ tiam estis movado pro danĝero de senlaboreco, por la droŝkistoj, poŝtistoj kaj prezoj de ĉevaloj... Malgraŭ ĉio tio, ĉu la hodiaŭa vivo estus imagebla sen fervojo ?

Kaj la batalo por kino - "gehomoj en malhela ejo"...

Hodiaŭ ni vidas la movadon de la koro, dank'al la atomo, kaj ĝian nunan evoluon kaj neniu povas antaŭdiri

ĝian bonecon aŭ malbonecon por morgaŭ aŭ postmorgaŭ.

Nia hodiaŭa komforto en nia "civiliza" vivo - elektro, vaporo, ŝtalo, kemio kun ĝiaj medikamentoj kaj aliaj uzoj, ktp - estas rezulto de nia homara inteligento en ĝia tuteco, kun ĝia sistemo de nuna vivo, kiel la leĝo de repuno : okulon pro okulo kaj denton pro dento.

Se oni ne povas hodiaŭ vangofrapi metilernanton por lin meti en bonan vojon, tio ĉi estas la sama afero kiel se oni ne povus meti ŝtalon en bonan formon, por ke ĝi faru korekte sian laboron estontece...

Se oni ne pendumus murdiston, nenio lin retenus remurdi iun tagon. Oni devas lin pendumi publike, por ke oni ne murdu aliloke.

- nn -

Ĉ U V I S C I A S,

\*\*\*\*\*

... ke dutaga profesia formado por firmaestro kun sekretariino (inkluzive de hotelo kaj restoracio, kompreneble en bela loko) kostas 5 800 FF dedukteblajn de la impostoj ?

En iu entrepreno laboras 7 oficistoj. Se ĉiuj farus dutagan staĝon en "Ĉambro de Komerco", 7 x 500 = 3500 FF estus la elspezo, ankaŭ deduktebla de la impostoj.

Kompreneble, la entreprenestro elektis staĝon por la firmaa estraro.

Ĉu laboristoj vere profitas profesion formadon ?

GILLES kaj la EYSINES-grupo.

\*\*\*\*\*

La venonta numero de "L A Ŭ T E !" aperos fine de novembro 1981.

Ĝi enhavos la debaton : "Ĉu ni estas pretaj ?" pritraktantan la situacion de la "movado" ĉe akcepto de leĝo favora al instruado de Esperanto en duagrada lernejoj.

\*\*\*\*\*

## LAŬT EKOLOGIO

En G O L F E C H (Tarn-Garonio)

\*\*\*\*\*

la 4-an de Oktobro 1981.

\*\*\*\*\*

Du tagojn antaŭ la "debato pri energio" en la franca parlamento la kontraŭatomcentralaj komitatoj, CFDT-sindikato, P.S.U., trokristoj kaj diversaj aliaj grupoj aranĝis manifestacion en GOLFECH, dimanĉon kvaran de oktobro, posttagmeze. Temis pri marŝado de VALENCE D'AGEN al GOLFECH kaj tie vizitado al la loko, kie komenciĝis kaj plu daŭras akcele kaj malkaŝe la preparado de la sidejo por 5200-megavatta atomcentralo decidita de la ĝiskarda registaro.

En la arigejo en Valence d'Agen oni havis la impreson, ke tiu manifestacio ne estos tiel ampleksa kiel iuj antaŭaj. Relative malmultaj homoj aŭskultis la 3-4 mallongajn paroladojn de la urbestro de Golfech kaj de responsuloj de la regiona kunordiga komitato. Tamen sur la vojo al Golfech la homamaso fariĝis pli kaj pli densa ĝis ĝi atingis la celitan lokon. Fine, oni taksis je 3000 (SUD-RADIO) aŭ 5000 (la organizintoj) la nombron de la partoprenantoj.

Surloke restas alirvojo al la ligna ronda bredejo konstruita de la kontestantoj. La manifestantaro laŭiris la pikdratojn malantaŭ kiuj tag-nokte plu fosas niaj tombejistoj. La komenca ekstremaĵo (kun nigra flago) de la homrubando duone ĉirkaŭiris la prilaboritan teron, dum ankoraŭ ne alvenis la lastaj promenantoj. Sed jam aperis la nigre vestitaj "ordigistoj" kaj ekkrakis la ofensivaj kaj larmigaj grenadoj. Suda vento pelis la venenajn nebulojn al la alia parto de la homamaso, kie infancj kaj gepatroj ne sciis kien fuĝi. Mi ne vidis, kiu komencis batali ĉe la avangardo. Verŝajne ne la "ordigistoj". Sed la grenadoj sufiĉe efikis por furiozigi homojn, kiuj normale ne estus partoprenintaj en detruado. Tiuj helpis la plej



agemajn por forigi parton el la barilaro, dum la ceteruloj refluis al pli ŝirmitaj lokoj, de kie ili povis trankvile spekti. Mazutujo kaj buldozero ekflamis. Elektraĵoj kaj telefonaj fostoĵoj estis teren ĵetitaj. Poste, EDF-ejo kaj aliaj budoj ricevis ŝtonojn kaj "koktelojn", dum la lokan fajrobrigadon draste haltigis koleraĵoj manifestantoj. Kiam noktiĝis, la vera manifestacio finiĝis sur la central-tereno sed pluis ĉe la aŭtovojo, kie ankoraŭ intervenis la "ordigistoj", perdante unu el siaj trupanoj, kiu, kaptite de aĉaj perfortuloj ricevis neprogramitajn batojn.

Kelkaj esperantistoj el pluraj departementoj tiuokaze renkontiĝis, sed ja ne esperanto estis temo en la tagordo...

#### Komentoj :

Kiel kutime en tiaj aferoj estas malsamopiniantoj. Komprenoble venis al la manifestacio homoj kun maskoj, dratranĉiloj, ŝtonĵetiloj kaj memfaritaj incendiaĵoj "bombetoj" : tiuj scias, kion ili volas - aŭ kion ili ne volas - kaj opiniigas, ke la "vera demokratia debato" en la parlamento estas iluzio. Mi agnoskas la kuraĝon de tiuj, kiuj ne timis alfronti per siaj ridindaj fortoj la soldate trejnitaĵojn kaj ege ekipitaĵojn senlaborulojn kun nigraj uniformoj kaj brilantaj kaskoj. Komprenoble oni povas nomi tiujn kuraĝulojn "provokantoj" aŭ "senresponsuloj". Sed inter la plej pacema homamaso estas ne nur ĝisostaj neperfortuloj. Kelkaj - eble ne multaj, sed facile influeblaj - ne povas resti senagaj, vidante pikdratojn, hundegojn kaj nigrajn bestojn pafilportantaĵojn. Mi vidis homojn, kiuj - eble ne racie ? - provis detrui ĉion simbolantan la estontan atomcentralon kaj de ili trafoblan. Malantaŭe, aliaj, multe pli multnombraj ĝue spektis la aferon. Mia propra racio havas gravajn mankojn. Ĝi flustris al mi :

- ke ni "neperfortuloj" ŝuldas al tiuj "provokantoj", ke fine la registaraĵoj devas iel kalkuli kun tiu kontraŭstaro, kiun ili subtaksis aŭ ignoris ;
- ke se tia vigla manifestacio estus okazinta pli frue, eble ankaŭ GOLFECH (samkiel PLOGOFF) ne plu estus en la listo de la estontaj megavatteĵoj ;

- ke sufiĉus iomete pli da "provokantoj", kaj la plimulto el la 3000/5000 personoj estus eble detruinta la tutan instalaĵaron kaj senkalsoneginta la centon da salajrataĵoj defendantoj de la elektrofaŝismo.

Etike, neperforto estas prava, sed sidejo de atomcentralo estas krimo ne nur kontraŭ la estetiko, sed ankaŭ kaj ĉefe kontraŭ la racio. Kiam la purigemuloj ne estas sufiĉe ekipitaj aŭ multnombraj, ili malaprobe spektu la fekaĵojn. Sed kiam la cirkonstancoj estas favoraj, kaj la vento bondirekta, laŭ sia kapablo ĉiu purigu !

... Sed nun, lokon al la aŭtenta racio, lokon al la "demokratio"... La deputitoĵo babilaĉu !

Kribo (81 10 05)

POST LA "DEBATO" ...  
\*\*\*\*\*

Eĉ ne babilaĉo, eĉ ne debat-ŝajnigo ! La "larĝa demokratika debato" promesita de Mitterrand estis malsprita farso, tute simila al tiuj, kiujn ni kutimis vidi sub la inta, dekstra reĝimo. Aŭdinte la vidpunkton de la socialista deputito Quilès, kiu raportis nome de la komisiono pri energio, oni povis supozi, esperi, ke iel utilos la prudentaj konkludoj de tiu raporto rilate la nombron de la novaj centraloj ekkonstruendaj, la situacion en LA HAGUE, ktp... Nu, malantaŭ la hipokriteco de la procedo aperas la kruda vero : la ruza Mitterrand kaj lia bando ignoras la dumbalotajn promesojn, kaj nome de "realismo" perfidas la sincerulojn, naivulojn, kiuj havigis al la franca socialista partio la eblecon montri kion ĝi kapablas.

Nu, nun ni scias. Plian fojon, la vera debato okazis ekster la Parlamentejo, ja sur la loko mem, en GOLFECH ekzemple.

Kontraŭas la urbestro, kontraŭas la lokaj deputitoj, kontraŭas la ĝenerala (departementa) kaj regiona konsilantaroj. Kontraŭas la plimulto de la popolo mem. Kion decidis la ŝtata regpovo ?

- ...

- Brave, vi divenis.

Ĝis la...

Kribo  
(81 10 07)

## TIPAĴOJ KAJ NOTINDAĴOJ

\*\*\*\*\*

## PRI VOJAĜO AL BRAZILIO KAJ RIO

\*\*\*\*\*

Jen kelkaj rimarkoj, kiujn montpellier-ano notis dum vojaĝo al Brazilo, okaze de la 66-a universala kongreso (25a de julio - 1a de aŭgusto 1981).

I. Dum la brazilia UEA-kongreso

\* Por la unua fojo en la historio de la esperantaj tutmondaj kongresoj, inaŭguro okazis en nacia parlamentejo kaj ĉeestis eĉ la vic-prezidento de Brazilo. La pola ambasada delegito alparolis la ĉeestantaron en esperanto kaj ricevis multajn aplaŭdojn. Kelkajn minutojn antaŭ la inaŭguro, sub blua ĉielo, brilanta kaj varmiga suno kaj sekiga venteto, ni vidis paraŝutigon de grandega verda flago.

\* Brazilio estas vizitinda, unue pro sia grandeco, kompreneble, sed precipe pro sia juneco kaj, konsekvence, pro la arkitekturo de la oficialaj kaj publikaj konstruaĵoj. Fakte, la "Monumenta Akso", unu el la ĉefaj strategiaj de la urbo, longa "nur" je 4 km proksimume, estas preskaŭ 500 m larĝa kaj ĉiuflanke kuŝas unudirekta 6-voja ŝoseo. La alia ĉefa stratego, laŭlonge de kiu abundas komercejoj, estas rimarkebla pro sia 12 km longeco. La parlamentejo, la teatrejo, la kongrespalaco (nia ĉi-jara kongresejo), la spertejo, 2 ministerioj (pri Eksterlandaj Aferoj kaj Justico), la katedralo, ĉiu havas sian propran arkitekturon same kiel kelkaj aliaj konstruaĵoj (ekzemple : la sidejo de la centra banko de Brazilo). Ankaŭ tre vidindas la preĝejo Dom Boŝco : mirinda ena spektaklo ! sur la kvar flankoj, staras ĉie vitraĵoj prezentantaj milojn da steloj sur helblua ĝis nigra ĉielo. Kiam oni ekvidas tion, oni staras kelkajn sekundojn senmova kaj senvoĉa, povante nur admiri.

\* Dum 7-taga restado en Brazilio, 5 vesperojn mi vizitis la ege modernan nacian teatrejon. Dimanĉon vespere (la 26-an) okazas brazilia vesperado. La tutaĵo estas ege interesa, kompreneble, sed kiel franco kaj precipe kiel

muzikamanto, mi neniam povos forgesi la mirindan interpretadon de la franca himno "La Marseillaise", ludita de brazila, ĝis nun nekonata de mi, gitaristo Villaverde. Li precizigas al la ĉeestantaro, ke li ludas tiun himnon por danki la francan popolon, kiu potence akceptis lin dum eŭropa deĵora vizitado. Mia opinio, li indas tiun akcepton almenaŭ pro sia nekredebla fingrolerteco. Poste, ni vidas diversajn popol-dancajn trupojn, kiuj reprezentas kelkajn brazilajn ŝtatojn kaj unu el la plej rimarkataj kaj rimarkindaj estas gaŭĉo-trupo.

Mardon, mi ekscias, ke morgaŭ okazos franclingva teatraĵo ne organizita de la LKK-anoj en la nacia teatrejo. Do, merkredon (la 29-an) post la ekskurso, mi decidis iri kaj ĉeestas prezentadon de "Le Bourgeois Gentilhomme" de Molière en la franca kun tute moderna scenejaranĝo de franca teatra trupo : Le Grand Magic Circus. Ĝi ege plaĉas al mi. Sed atentu ; eksterordinara afero : en la okcitana lingvo la aktoroj ludas la unuan scenon. Ĉu ne maloftaĵo, ke franca sudulo aŭdas la okcitanan lingvon en tiel malproksima lando kiel Brazilo ! Mi devas konfesi, ke tion mi tute ne atendis.

\* Kiam mi promenas tra la granda halo de la kongrespalaco, mi renkontas multajn gejunulojn brazilajn, kiuj, legante sur mia insigno "Francio"-n, haltigas min kaj entuziasme parolas al mi pri Francio kaj siaj fortaj deziroj lerni la francan lingvon. Hazarde, iu el la junaj helporganizantoj diras al mi, ke li post 2 aŭ 3 jaroj iros al... Montpellier (tiun vorton li diris al mi post eta serĉado), por daŭrigi sian studadon. Kompreneble, li ankoraŭ ne sciis, de kie mi devenas.

\* Okaze de iu kunveno, mi troviĝas apud gesinjoroj Guillaume. Subite, iu viro alparolas s-inon Guillaume, ĉar li konis ŝin (kaj cetere ankaŭ ŝian familion), kiam ŝi estis dekokjara. Interesa afero por mi estas (tion oni klarigis al mi poste), ke temas pri la pra- pra- pra-nepo de M. Waleska.

\* Dum la tuttaga ekskurso, mi elektis vojaĝon al Cristalina, urbo situanta 130 km sude de Brazilio. En la aŭtobuso, mi sidas apud Vasja, babilema kaj moviĝema bulgarino. Ŝi sciigas al mi, ke ŝi estis la kasistino de la Varna-kongreso kaj ke ŝia brazilia vojaĝo kostas al ŝi la ekvivalen-

ton de 10 monataj ŝalajroj. Ĉe la alia flanko de la aŭtobuso sidas E. Symoens; mi konas lin laŭnome ĝis nun pro la multaj interesaj artikoloj, kiujn li verkis por la revuo MONATO, en 1980, pri la sendependiĝo de belgaj afrikaj kolonilandoj. Dum la tuta vojaĝo ni trapasas nur savanon kaj E. Symoens asertas, ke ĝi samaspektas en Afriko. En tiu regiono troviĝas ĉiuspecaj minejoj kaj svarmas en Cristalina vendejoj de belaj gemoj. Sed ankaŭ surstrataj junaj vendistoj abundas kaj oni avertis nin nenion aĉeti al ili. Tamen tion kelkaj el ni faros. En la "churrascaria" (tipa tiea restoracio) ni tre bone kaj abunde manĝas. La plej notinda tipaĵo konsistas el viandaĵoj trapikitaj sur spado enpuŝita kun 3 aliaj en sufiĉe granda lignero metita sur la tablo. La ekskurso iom fuŝiĝas, ĉar estas truo en la trasavana vojaĉo kaj la busoj ne povas plue antaŭeniri. Estis antaŭvidite viziti minejon kaj etan akvofalon. Finfine ni revenas al Brazilio kaj laŭlonge de la vojo ni vidas centojn da termitejoj.

\* Iun tagon mi parolas kun s-ro Mesplède el Arcachon kaj dum la konversacio li sciigas al mi, ke la fama vagonareto de Palavas nun funkcias en Marquèze (Landes). Tio estas historieto komprenebla nur de Montpellier-anoj. Temas pri malnova kaj malrapida sed ege populara vagonaro, kiu veturis de Montpellier ĝis Palavas-les-Flots ĉe la Mediteranea marbordo (ĉ. 10 km), kaj kiu ne plu funkcias de almenaŭ 15 jaroj pro ekonomiaj kialoj.

\* Vendredon posttagmeze, la franca ambasadoro en Brazilio invitas ĉiujn francajn gekongresanojn. Nu, je la 14a horo, ni foriras aŭtobuse el la kongresejo kaj post sufiĉe longa serĉado ni haltas antaŭ la trikolora flago, kie priklareca delegito atendas nin. La ambasadoro kaj lia edzino akceptas proksimume kvindek da francoj; dum unu horo ni interbabilas, manĝetas biskvitojn, trinkas kafon aŭ francan ĉampanjon. Poste ni revenas al la kongresejo, ege kontentaj.

\* Pro miskompreno inter ni kaj la vojaĝagentejo ni ne povas ĉeesti la solenan fermon de la 66a u.k. kaj devas iri je la 10a al la flughaveno por flugi ĉu al Rio, ĉu al la grandega akvofalo "Ignacu". Tiamaniere ni adiaŭas la grandegan brazilan ĉefurbon kaj ĝian kongreson.  
(daŭrigota)

Louis ENSUQUE

## NIA ADRESARO

Novaj adresoj aldonendaj al la Adresaro de "Laŭte!" aperinta en julio 1981:

### FRANCIO :

24640 CUBJAC

- Mauriange Jacques  
pl.Roland Grandou  
t: 05 30 18

29000 QUIMPER

- Boubarne Daniel  
Auberge de Jeunesse  
6 av.des Oiseaux  
t:(98)55 41 67

31620 FRONTON

- Auberger Marcel  
Rue Garenne

37800 STE MAURE DE TOURAINE

- Bouloiseau Marcel  
2 Pré de la Vigne  
Ste Catherine de Fierbois

44400 REZE

- Piou - Poetic 7  
194 r.Maurice Jouaud

53170 MESLAY DU MAINE

- Dugré Robert  
Bazougers  
60000 BEAUVAIS  
- Masson Michel  
7 r.Fontaine Bellerie

66000 PERPIGNAN

- Bustin Martin  
2 rue du Musée

77100 MEAUX

- Lopez Armand  
52 rue Thiers  
Nanteuil

84000 AVIGNON

+ Ducellier  
14 r.Kléber-Auquier

### OKC. GERMANIO :

+ Böhringer Ursula  
Eisenbahnstr.5  
D 7415 WANNWEIL

- Bühl Hans-Hermann  
Postfach 292  
D 7410 REUTLINGEN 1

### ISLANDO :

- Kristjansson F.  
Byggdavegur 141  
Poŝtkesto 62  
602 AKUREYRI

### IZRAELIO :

- Löwenkopf Teddy  
Emek Hayarden  
15160 MAAGAN

### JAPANIO :

- Hirai jukio  
C 16-304, 5-2  
Korigaoka  
Hirakata-si, 573

### NEDERLANDO :

- de Groot Geert  
Lange akker 1  
NL 8431 PH OOSTERWOLDE frl.

### SVEDIO :

- Nilsson Ynqve  
Käppland  
S 741 00 KNIVSTA  
- Erlandsson E.G.  
Edv.Lindhalsgatan 143  
S 217 42 MALMÖ

Forigi : F 41600 LAMOTTE BEUVRON  
(La nova adreso de "Loisirs Sains"  
estas ne ankoraŭ konata)

ĝustigo

modifo

modifo



TRA LA MONDO  
per biciklo kaj esperanto  
\*\*\*\*\*

Mi rimarkas la silenton, la diskretecon regantajn en tiuj paperdomoj. Kredeble, ĉiuj dormas jam !

Mia kunulino respekte min atendas, ankaŭ ŝi vestita per parfumita kimono. Neniu aroganteco, sinteno simpla, mi preskaŭ dirus edzina, de juna fianĉino iom timigita. Mi demetas mian kimonon kaj ŝi zorge ĝin ordigas. (Niaj vestoj estis ŝanĝitaj kontraŭ kimonoj. Ili estos redonitaj je nia foriro, senpolvigitaj kaj gladitaj.)

Miainvite ŝi sidiĝas apud mi senprovoke, senparole. Tiam delikate mi demetas al ŝi la kimonon, kaj ĉion, kaj ĉion. Baldaŭ ŝi estas antaŭ mi, skulpte bela, gracia, afabla, altira kaj diskreta. Vidante, kiel tendencas nia duopo, impulsgeste, spontanee, ŝi sin ĵetas rekte en miajn brakojn kaj komencas sian profesion de bonedukita amoro. Momente ni estas nur du homoj, mi dirus du junaj animaloj, kiun kunigis la leĝoj naturaj kaj hazardaj.

Ĉu mi rakontu detalojn eĉ plej intimajn ? La leganto komprenu la situacion de viro juna, delonge "fastanta" pli-malpli sporade.

Estas amludoj, karesoj, ĉiam senafektaj kaj sen kaŝitaj pensoj. Kelkafoje ŝiaj grandaj okuloj nigraj kaj seriozaj fikse min rigardas, serĉante en la miajn la sekreton de l'angoro, kiun eble divenas ŝia virina animo. Baldaŭ pace ŝi ekdormas en miaj brakoj kun fido ne simulata. Mi ne dormas, mi ne dormos eĉ unu sekundon. Feliĉega kaj lucida mi ĝuas tiujn momentojn mirindajn kaj romantikajn. Mi rigardas ŝin dormi. Alterne mi hontas, furiozas, ekscitiĝas. Svarmo da pensoj, deziroj, kirliĝas en mia spirito. Mi penas por malkovri la belagan sekreton de nia naturo en tiu mirveka simbiozo de du estuloj tiel profunde malsamaj kaj malgraŭ ĉio tiel similaj.

Ŝi vekigigas duone ; sentante mian zorgemon, ŝi kisas min karese kaj tuj denove ekdormas. En la domo ĉio ŝajne dormegas, ĉio krom mi. La strato, tiom brua dum plejparto de la nokto duonekdormas je tagiĝo. Ankoraŭfoje

mi rigardas tiun knabineton : ĉar nun ĉiam pli tia ŝi aspektas por mi. Tiam mi falas en duondormajn sonĝojn. Senorde mi revidas la ĉefajn momentojn de tiuj lastaj jaroj : Parizon, Irkutskon, Lavardakon, mian familion, malsaĝajn aventurojn kun diversaj amikinoj, virinon misteran kaj eternan, celon kaj turmenton de vira vivo. Nun ŝi tute vekigigas, anĝele ridetante. Spontanee ŝi brakumas min kaj arde min kisas. Ĉu ruzulino, prostituitino ? sanktulino ? "Stultulo, mi pensas, prenu tiun knabinon tia, kia ŝi estas kaj pensu pri nenio alia." Ĉu tiu virino sin tenas kiel femalo vendita, sklavinino ? Ĉu ŝi malnobliĝas ? Ĉu ŝi malnobligas sin ? Ne, evidenta sincero eliĝas el sia tuta persono.

Estas kortuŝa momento, profunde emociiga, kaj, ĉu tion konfesi : mi esploras kiel vera infano, kiun mi restis. Ŝia mirigita rigardo petas mian pardonon. Ŝi ne komprenas tiujn larmojn, kaj verdire ankaŭ mi. Fortega bezono interparoli, interŝanĝi ideojn, min kaptas. Ve, ŝi komprenas eĉ ne unu fremdan vorton, kaj mi ne la japanan. Ŝi prenas krajonon kaj paperon kaj provas per sia mistera desegno-skribo diri ĉion, kion ŝi volus konfidenci al mi. En tiu sekundo ni estas du bonaj geamikoj reciproke komplezemaj kun, ĉe tiu knabino, neesprimebla bonvolo. Dum momento mi kredas kompreni, ke ŝi petas trinkmonon : mi donas al ŝi unu jenon. Sincere ofendita, ŝi rifuzas mian sentaktan geston. Tiam mi komprenas, ke ŝi deziras nur etan memoraĵon. Mi havas nenion krom mono kaj... ventumilo. Ŝi skribas kelkajn vortojn sur paperpeco kaj komprenigas, ke mi bonvolu konservi tiun modestan memoraĵon pri nia neforges-ebla nokto. Ankoraŭ longe ni restis nin rigardantaj, demandantaj per rigardo kaj manoj sen alia deziro ol ĝui nian reciprokan ĉeeston. Tiaj surprizis nin kamarado Matt. Tuj mi petis, ke li traduku ŝian skribaĵon : "Ho, alilandano, neniam mi cin forgesos, nek forgesos la nokton kune travivitan. Mi cin amas." El tiuj du linioj de humila prostituitino estis nekonjektitaj sekvoj. Mi estis adoptita de la japanoj kaj aŭreolita de ĉiam kreskanta prestiĝo en ĉiuj E-istaj rondo. Ĉar, kvankam mi petis diskretecon, kamarado Matt forte beligis mian banalan aventuron. Kompreneble, mi ne garantias la tradukon aŭtenta, sed mi havas nenian moti-von kredi al perfidaĵo....

Miaflanke, sur la ventumilo mi skribis nur tiujn vortojn: "Estu feliĉa, sed forlasu tiun profesion". Vantaj vortoj, kruelaj kaj stultaj, se oni memoras la truditajn ĝenojn legajn kaj sociajn, kiuj regas en Japanio tiurilate. Ŝi kuras al mi kaj provas repreni sian paperon. Ŝi ja scias, pli bone ol mi, en kian senrevenan rutinon ŝin metis la socio.

Sed antaŭ kamarado Matt ŝi denove sin regas. Denove ŝi aspektas obeema virino kaj modeste nin kondukas al la lavokonkoj. Nur ŝi el la personaro konsentis min akompani ĝis la aŭto de miaj amikoj en kuntuŝiĝa strato. Ĝis kiam la veturilo malaperis en kurbo, mi vidis la naztukon de la junulino svingiĝi ĉe la ekstremaĵo de ŝia delikata braketo...

NIIGATA, la 13an de julio 1930.

Finfine mi trovas hotelon. Kiu diras "hotelo", tiu diras ankaŭ laŭregulan banon kaj bano signifas ankaŭ ...ĉarman sinjorinon tute nudan en la banejo. Senhonte ŝi finas sian tualeton kune kun mi. Pri la japanaj banoj mi ekkutimiĝas. Tamen mi konfesas, ke el ambaŭ piej embarasita kaj konfuza estis mi.

La antaŭurbo de TOKIO-KIBOSHA. Merkredo la 20an de aŭgusto 1930.

Hieraŭ mi alvenis en plurkultura lando post longtaga vojaĝo. Ĉi tie oni vidas kampojn de teo, patatoj, rizo kompreneble, kaj ankaŭ maizo. Ni estas en plata lando kvadrata per multaj irigacikanaloj kun kota akvo. Tiuj kanaloj utilas ankaŭ por direkta la legomajn produktojn al la ĉefurbo per boatetoj. Estas nederlanda angulo ĉi tie transportita. Laŭlonge de la vojo la legomistoj starigis subĉielajn budojn kaj ofertis siajn produktojn.

TOKIO. La bulvardo, per kiu mi malkovras la urbon, estas tre larĝa, kio ne kutimas en Japanio. En la centro policisto afable indikas al mi la direkton al Kibosha, kie mi estas invitita. Je la 19a mi alvenas antaŭ marmorpalaco: estas Kibosha, el kie radias la esperantista movado tralanden. En tiu modernega klubo mi estas prince kaj afable akceptita. Ho, japana gastamo!

Alfa-Beta (daŭrigota)

## LIBRO-SERVO DE A.E.R.A.

adreso :

Cercle espérantiste  
de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut

poŝtkonto :

3 371 74 M Bordeaux

La prezoj, en francaj frankoj, ne entenas la afrankon. Aldoni por sendokostoj: 25% ĝis 25 FF, 20% ĝis 50 FF, 15% super 50 FF. Da iuj libroj estas nur eta kvanto.

ABC d'espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres (Waringhien)	5.
Al la Junuloj (Kropotkin)	4.
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (Neergaard)	30.
Nouveau Cours rationnel et complet d'espéranto (broŝ.)	35.
(bindita)	40.
(brokante)	15.
Ĉu li? (Valienne)	50.
Dictionnaire pratique, tole bindita (F/E kaj E/F)	12.
Dictionnaire de poche (F/E kaj E/F)	5.
Doktoro Rosales (Giorgio Silfer)	12.
Esperanta Mozaiko (Faulhaber)	180.
Esperanto en Perspektivo (Lapenna)	25.
Esperantologiaj Kajeroj 1 (Szerdahelyi) (brokante)	25.
Eroj (M. Boulton)	7.
Fabelo pri bona suneto (albumo por infanoj)	10.
Forto de l'vero (Adi)	25.
Freŝa mateno (Reuven Kritz)	60.
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)	2,50
Gvidlibro por la ekzamenoj de FEI	40.
Hamburgo en retrospektivo (Lapenna)	10.
Historio de SAT	10.
Junulejo (Miguel Cané) - La buĉejo (Echeverria)	20.
Junulkurso (komentoj franclingvaj)	4.
Suplemento al Junulkurso por franclingvanoj	20.
Junulkurso kun komentoj portugallingvaj	10.
Kalejdoskopaj Varieteo (Ergoto de Bonaero)	8.
Kalevipoeĝ	7.
Kiel esti amata (Brandys)	25.
Kredu min, Sinjorino! (C. Rossetti)	20.
La Krismo de l'Milito (Alberdi)	20.
Libero kaj Amo (Petöfi)	20.

La tundra ĝemas (Eroŝenko)	<u>kun afranko</u>	20.
Lumo kaj ombro (Eroŝenko)	<u>kun afranko</u>	20.
Liberigo de timo kaj mizero		1.
Lingvaj respondoj (Zamenhof)	bindita	15.
La varmega suno (albumo por infanoj)		5.
Malvasta kaĝo (Eroŝenko)	<u>kun afranko</u>	25.
Ne tiel, sed tiel-ĉi (Faulhaber)		12.
Natura metodo por resaniĝi		5,50
Ni devas vivi (Kjell Walraamoen, Lina Gabrielli)		20.
Paŝoj al plena posedo (W.Auld)		40.
Plena analiza gramatiko de esperanto, bindita		105.
Plena Ilustrita Vortaro		240.
Plena vortaro de esperanto kun suplemento		50.
Por la Praktikantoj (Babin)		22.
Poŝatlaso de la mondo		16.
Sarkasme kaj entuziasme (Miyamoto Masao)	<u>kun afranko</u>	37,50
Sennacieca Revuo, 1978.		10.
Skiza historio de la utao (Miyamoto)	<u>kun afranko</u>	25.
Skizo pri filozofio de la homa digno (Gille/Lanti)		7.
Studoj pri la esperanta literaturo (Benczik)	<u>kun afranko</u>	37,50
Sur insulo malproksima (Remmers)		14.
Sveda Antologio		25.
Tio kion mi kredas (Jean Rostand)		8.
Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz)		40.
Unua legolibro (Kabe)		10.
La verda raketo (Jean Forge)		16.
Vivo de Lanti (Borsboom)		52.
Vivo de Zamenhof (Privat)		35.
Vocabulaire espéranto (Duc-Goninaz)		15.
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)		35.
Vers une communication transnationale	2 ekz.	1.
	20 ekz.	8.
Diskoserio de Junulkurso		30.
Kasedo de Cours rationnel		30.
Une langue internationale pour écologistes et non-violents	100 ekz.	15.
Interesa Arkeologio (Marinko Ĝivoje)		12.
Manifesto de la Paco (Zimmer kaj Schmidt)		6.

\*\*\*\*\*  
 \* Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut \*  
 \* Commission paritaire 58651 \*  
 \*\*\*\*\*